
IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 56 - trimonata
2026/2

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Ekaterina V. Bebenina
Laura Brazzabeni
Aurora Bute
Probal Dasgupta
Latifou Gbadamassi
Gong Xiaofeng
Mireille Grosjean
Zsófia Kóródy
Aranka Laslo
Alessandra Madella
Vicente Manzano-Arrondo
Elena Nadikova
Ozasa Rjota
Tida Syuntaro
Renée Triolle
Ŭatanabe Saki



Radojica Petrović (1949-2026)

ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Alessandra MADELLA) 3
Rememoroj pri Radojica Petrović (Elena NADIKOVA, Aranka LASLO, Aurora BUTE, GONG Xiaofeng, Probal DASGUPTA, Vicente MANZANO-ARRONDO)..... 4
Ekaterina V. BEBENINA: *Paderborna eksperimento kaj ĝia teorio […](III.)* 14
Pretas la programo de la Kongreso kaj Simpozio 2026 (Alessandra MADELLA) .. 20
Ni kantu, kantu, ofte, kune, ni kantu! (Mireille GROSJEAN) 22
El la landoj kaj sekcioj (BN, DE, IT) 25
Transjara KursKunveno (TKK) „Etsu Nen" (GROSJEAN, OZASA, ŬATANABE) 27
Kolokvo pri pedagogio Freinet (Renée TRIOLLE) 30
TIDA Syuntaro: *Instruado de Esperanto en japanaj universitatoj* 32
Informoj pri ILEI kaj IPR..... 37

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio. Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, Via Montanara Sud 91a IT-46010 Campitello (Mantova) Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Ul. Bočačka 25, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, R. S. Francisco Xavier, 681, bl E, ap 201, Maracanã - cep: 20550-011, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj.

Estrarano: Aimé-Patrick MANIRAKIZA, Buhomba 7 Nr 39, Maramvya, Bujumbura, Burundo, Tel. +25779813485 (Whatsapp, Telegramo), <*apmanirakiza@gmail.com*>. Agado pri Afriko, observanto ĉe TEJO.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford
***Membroj*:**
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu
Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Titolpaĝe: Forpasis Radojica PETROVIĆ, la rememorojn vortojn de liaj kunlaborantoj legu sur p. 4-13.

Dorskovrile: Radojica PETROVIĆ dum la 49-a ILEI-Kongreso en Nyíregyháza 2016 (Hungario), kie li organizis la kutiman Lingvan Festivalon. (*Malsupre*: Radojica kun Aranka LASLO en la Lingva Festivalo).

Enkonduko

Karaj legantoj,

Hodiaŭ mi skribas al vi nome de nia Prezidanto Ahmad Reza Mamduhi, kiu travivas malfacilan situacion en Irano, kaj nome de la tuta Estraro, por memori nian karan kolegon Radojica Petrović. Kiam forpasas iama Prezidanto de ILEI, kiu dum jardekoj akompanis la agadon de la Ligo kaj kapablis motivigi novulojn al pli plena partopreno, certe la manko sentiĝas tre forte. Legante la omaĝojn de pluraj homoj al li proksimaj, vi malkovros, kiom multe li faris, ofte en la kulisoj, sed ĉiam klopodante malfermi mondojn al junuloj kaj antaŭenigi interkulturan komunikadon. Al tiuj atestoj mi aldonus lian grandan zorgon pri Premio La Torre, per kiu li volis ne nur digne memori amikon, sed ankaŭ altigi la sciencan nivelon en Esperantujo.

Honore al li, ni klopodis realigi altkvalitan numeron, kiu enhavas seriozajn kaj utilajn kontribuojn. Inter ili estas la tria parto de la serio de Ekaterina V. Bebenina pri meta-lingvistika kompetento, kiu proponas uzi la propedeŭtikan efikon de Esperanto kiel didaktikan principon por la kreado de novaj fakoj. Tiu noviga aliro certe estos parto de la Simpozio de ILEI 2026.

Tida Syuntaro donas al ni rare detalan raporton pri sia universitata instruado de Esperanto. Renée Triolle familiarigas nin kun la Freinet-edukado, kaj Mireille Grosjean kun novjara kurso en Japanio. Espereble la numero helpos nin teorie kaj praktike antaŭenigi nian instruadon de Esperanto, cele al interkultura dialogo kaj monda paco.

Alessandra MADELLA,
vicprezidanto de ILEI

Rememoroj pri Radojica Petrović (1949–2026)

Elena NADIKOVA, sekretario de ILEI, Rusio:

1. Mi konatiĝis kun Radojica Petrović en 2003 (koresponde), kiam mi unue komencis instrui Esperanton al miaj lernantoj. Tiam miaj amikoj el nia Ĉuvaŝa junulara E-asocio proponis al mia klubo partopreni en la projekto „Interkulturo" de ILEI. Radojica Petrović en 2003 iĝis Prezidanto de ILEI kaj „Interkulturo" aparte estis en lia atento.

La projekto celis interkulturan edukadon de homoj, unuavice de junularo: „plialtigi la nivelon de interkulturaj scioj ĉe junuloj faciligante al ili interkulturan komunikadon; ebligi al grupoj, kiuj lernas iun lingvon, praktiki siajn lingvosciojn en internacia medio". Radojica ĉiam substrekis gravecon de tiuj direktoj en agado de ILEI.


„Interkulturo" estis lanĉita en 1998 dum UK en franca Montpellier. La ĉefa ideo estis dekomence – doni al tiuj, kiuj lernas Esperanton, eblon de ĝia praktika uzado en internacia komunikado. Tio helpus al la partoprenantoj konatiĝi kun kulturoj de diversaj popoloj, kompreni iliajn viv- kaj pensmanierojn, moralajn kaj aliajn valoraĵojn; malfermi por si mem ion konatan kaj gravan en malproksima socia medio. Kaj tiel en konscion de partoprenantoj enirus toleremo, mensa klerigo, reciproka estimo inter popoloj kaj iliaj kulturoj.

La unua paĝaro de la projekto – „Kvazaŭ Lernejo Tibor Sekelj" – estis kreita en Tria Roma Universitato en Italio. En 2000 en la projekto partoprenis 97 klasoj el 25 landoj de ĉiuj kontinentoj. La plej diskutataj temoj estis naciaj festoj, muziko, lingvoj, bestoj.

En oktobro 2003 ILEI kaj E@I (Edukado ĉe Interreto) subtene de ESF ellaboris novajn principojn kaj metodologion de la projekto kaj kreis ĝian paĝaron www.interkulturo.net (nun ne plu funkcianta, bedaŭrinde). Kaj komenciĝis nova periodo de la projekto. La partoprenintoj tradukis kaj prezentis fabelojn kaj legendojn de siaj popoloj, rakontis pri siaj loĝlokoj kaj samlandanoj, partoprenis en kvizoj pri libroj de naciaj literaturoj, faris esplorojn pri siaj kulturoj. Radojica diligente sekvis la evoluon de la projekto kaj planis ĝian pluan disvolvon.

2. La unua mia persona renkontiĝo kun Radojica Petrović okazis post unu jaro en Bratislavo, kie en 2004 oni organizis la 37-an ILEI-konferencon. ILEI proponis tiam seminarion pri la projekto „Interkulturo" invitante gvidantojn

de la plej aktivaj grupoj. Mi partoprenis en ĝi kune kun mia samurbano Sergeo, kies studenta klubo ankaŭ aktivis en la projekto. Radojica kiel Prezidanto de ILEI estis tre bonveniga kaj multe rakontis al ni, tute nespertaj novuloj, pri la projekto mem, pri instruado de Esperanto kaj pri monda Esperanto-movado ĝenerale. Mi memoras, kiel li zorgis, ke ĉiuj novuloj komprenu ĉion kaj eksciu kiel eble plej multe pri Esperantujo. Tiuj informoj, verdire, tre mankis tiam al mi kaj al mia akompananto kaj tial ni multe lernis de Radojica. Jam tiam li permesis al ni nomi lin simple Rade kaj tio iĝis por ni signo de konfido kaj estimo al ni flanke de la E-komunumo.



De maldekstre: Mireille GROSJEAN, Elena NADIKOVA, Stefan MACGILL, Radojica PETROVIĆ

Ni konatiĝis ankaŭ kun liaj edzino Svetlana kaj filino Sonja. Kiam estis libera tempo inter kaj post diversaj programeroj de la konferenco, ni ofte interparolis ankaŭ kun ŝi. Sonja tiam multe aktivis en TEJO kaj rakontis pri diversaj ĝiaj agadoj. Danke al tio mi vidis kaj komprenis, ke Esperanto povas tre interese variigi vivon kaj konatigi kun novaj amikoj. Por mi, la knabino el iama fermita SovetUnio, tio estis vera ŝoko. Ĝis nun mi estas tre dankema al ILEI kaj al Radojica kiel ĝia tiama Prezidanto pro la invito al Slovakio,

ĉar tio engaĝigis min ene de la internacia Esperanto-movado. Multe inspirite pri tio, kion mi vidis kaj eksciis dum la konferenco, mi poste daŭrigis mian tre interesan por mi kaj miaj lernantoj laboron kun mia E-klubo ene de Rusio kaj ne nur.

Dum la konferenco Radojica tre zorgis ankaŭ pri alia grava ILEI-projekto – Flugiloj de malfacila vento. Ĝi celis trejnadon de junaj E-instruistoj kaj pasis same en formato de seminario. Laŭ miaj scioj, ILEI organizis tiam kelkajn tiujn seminariojn kaj tiel „naskis" multe da novaj E-instruistoj. Dum mia posta laboro en ILEI mi vidis, kiel Radoica zorgis pri preparado kaj trejnado de novaj E-instruontoj kaj konstante substrekis, ke tio estas gravega strategia tasko de la Ligo.

3. Poste sekvis longjara koresponda komunikado kun Radojica Petrović, ĉar ekde 2005 mi komencis gvidi la rubrikon „Interkultura Mondo" en Juna Amiko. Radojica kune kun Stefan MacGill diligente sekvis la eldonadon de *Juna Amiko* kaj helpis per konsiloj kaj indikoj.

4. La dua mia persona renkontiĝo kun Radojica PETROVIĆ okazis en 2016 en Svislando, en Les-Brenets. Tie oni invitis al ĉeesta labora estrarkunsido de ILEI. Tri tagojn Mireille GROSJEAN, Radojica PETROVIĆ kaj Stefan MACGILL pridiskutis agadon de ILEI: giajn planojn, strategion, dokumentojn, ĉiutagajn taskojn, eventojn kaj perspektivojn. Radojica montris sin kiel tre bona kaj saĝa kompetentulo ne nur pri la Ligo mem, sed ĝenerale pri monda aktivado. Ofte okazis debatoj inter tiuj tri movadaj moŝtuloj, sed ĉiam ili trovis necesajn solvojn por ĉiuj problemoj kaj defioj. Mi tre bedaŭras nun, ke ni ne faris video- aŭ sonregistraĵon tie, ĉar tiu kunsido, vere, povus esti perfekta trejnado por ontaj gvidantoj en Esperantujo. Feliĉe, restis la protokolo, tamen, certe, ĝi ne kapablis konservi diversajn voĉmoduladojn, vizaĝ-esprimojn, ridetojn k.a., kio ĉiam gravas dum komunikado.

Aparte valoraj por mi estis ankaŭ liberaj interparoloj post strečaj laboraj horoj, kiam ni kvarope promenis aŭ vizitis najbaran urbeton. Tiam Radojica multe rakontis pri sia vivo en Esperantujo, pri landoj, kiujn li vizitis danke al Esperanto, pri diversaj E-eventoj, en kiuj li partoprenis kaj kiujn li mem organizis. Kaj mi bone memoras liajn vortojn: „Esperanto plene ŝanĝis mian vivon kaj eĉ la vivon de mia tuta familio". Tiuj rakontoj sonis kiel alloga romano! Li interesiĝis ankaŭ pri mia vivo kun Esperanto post la Bratislava konferenco. Li helpis kompreni multajn aferojn pri homa konscio, pri kio mi ne pensis antaŭ tio. Do, neforgesebla sperto por mi!

5. Poste sekvis komuna laboro kun Radojica PETROVIĆ en la Estraro de

ILEI kaj renkontiĝoj dum konferencoj kaj poste kongresoj de la Ligo. La lasta persona mia renkontiĝo kun Radojica okazis dum la 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak, Serbio. Ĝi okazis en la Universitato, kie instruis Radojica. Mi vidis tiam, kiel liaj kolegoj estimas lin kaj kiom ili pretas helpi en okazigo de la ILEI-kongreso. Mi certas, ke ĉiu homo fierus pri tia estimo al sia profesia kvalito.

Do, multajn vortojn eblus ankoraŭ diri pri mia kolego en ILEI Radojica PETROVIĆ. Sed mi diros simple: helan memoron al Radojica PETROVIĆ el Serbio kaj dankon al li pro ĉio, kion li faris por Esperanto!

Do, dankon al Radojica pro tio!

Aranka LASLO, estro de ILEI-RS

Ni, serbiaj esperantistoj, adiaŭas nian karan samideanon, elstaran homon, esperantiston en koro kaj animo.

Por mi persone, Radojica kiel instruisto donis idealon kaj gvidilon en la kampo de Esperanto-instruado – kaj ne nur. Niaj E-vojoj kruciĝis antaŭ nelonge. Ni ĉefe kunlaboris en la Instruista sekcio de Serbia E-Ligo, pri projektoj kaj pri la retejo de SEL. Li estis por mi kvazaŭ mentoro, ankaŭ kunlaboranto kaj tre bona amiko.

Ekde mia ILEI-membriĝo en 2015 li forte subtenis mian lernejan agadon – la E-fakrondon kaj la KER-ekzamensesiojn en la Politeknika Lernejo en Subotica – kaj instigis la diskonigon de tiu agado en ILEI-kongresoj kaj aliaj eventoj, allogante, inter aliaj, ankaŭ miajn gefilojn al ILEI-kongresoj. Unu el tiaj subtenoj estis lia dufoja gastado en la menciita lernejo en 2016 kaj 2017, kie li plurmaniere kontribuis al la postekzamena amika programo: per prelegoj, interaga kvizo kaj literatura ateliero.

En 2023 Radojica transdonis al mi la gvidadon de la ILEI-RS kaj mi ekgvidis, kun lia helpo, ankaŭ la Instruistan sekcion de SEL, kiu – laŭ lia ideo – estis formita kiel kunligo de ILEI-anoj kaj SEL-anoj, aktivaj en Esperanto-instruado kaj ĝia subteno.

Preskaŭ ĉiu kampo de Esperanto, en kiu mi ĝis nun laboris, estis iamaniere ligita al li. Li instigis mian partoprenon en la Rumana scienca kolokvo en Timiŝoara kaj en ILEI-kongresoj, por prelegi pri mia lerneja agado pri Esperanto. Li subtenis la Instruistan Trejnadon en Poznano por Nedeljka LOŽAJIĆ kaj por mi, kadre de Erasmus+ projekto 2023/24, kaj

ankaŭ la eksterlandan edukiĝon de Danijela PETROVIĆ kaj Blanka LASLO, kunorganizis la poraktivulan kaj porinstruistan trejnadon de ĉirkaŭ 30 partoprenantoj en 2024 en Zemuno (Serbio) dum la Kongreso de blindaj esperantistoj, kuraĝigis mian partoprenon en la konkurso *La Torre* kaj multajn aliajn iniciatojn. Li subtenis ĉiujn – kunlaborantojn kaj kursanojn – kuraĝigante, kontribuante kaj helpante, fervore kaj senlace.

Por li estis tre grave en 2019 inviti kaj gastigi la ILEI-kongreson en sia loĝurbo, Ĉaĉak, en la Fakultato de Teknikaj Sciencoj, kie li laboris, en la jubilea jaro kiam ILEI festis sian 70-jariĝon, same kiel kelkaj kongresanoj – inter ili ankaŭ Radojica. Li iniciatis, kaj kiel ano de la LKK ankaŭ multe kontribuis al la organizado de la pasintjara ILEI-kongreso en Beogrado, en kiu li bedaŭrinde ne povis partopreni.

Li grave rolis ankaŭ en serbiaj retkursoj de Esperanto. Liaj konversaciaj kursoj, gvidataj dum la lastaj jaroj, estis inter la plej popularaj kaj ŝatataj, kaj fariĝis internaciaj – komence neplanite – kun aliĝo de eksterlandanoj kaj kun granda subteno de karmemora Renato CORSETTI. Mi estas feliĉa, ke mi havis la ŝancon partopreni en lia lasta reta kurso pri la gramatiko de Esperanto en 2024/25.

Kun Renato CORSETTI kaj Aurora BUTE, Radojica iniciatis ankaŭ la laborgrupon de Balkanaj kaj Danubregionaj esperantistoj komence de 2023, kaj poste aktive agadis en ĝi.

Tiuj estas nur kelkaj eroj el miaj rememoroj pri kara Radojica, ĉar ne eblas mencii ĉion, kion li faris por kaj per Esperanto, laborante ĝis la lasta tago. Ĉi-jare ni kune verkis novan Erasmus+ projekton kaj havis pliajn planojn, esperante, ke estos tempo por ilia realigo.

Li foriris por ĉiam, sed ne forestas. Li restas kaj restos inter ni.

Triste, kun alta respekto,

Aurora BUTE:

Komence de marto, tra Balkanio flustris trista novaĵo: forpasis Radojica! Malfacile kredi aŭ akcepti, ke la homo, kiu aktivis Esperante en sia lando, Serbio, en sia regiono, Balkanio, kaj kadre de ILEI, en kelkaj kontinentoj, ne plu estas…

Radojica esperantistiĝis en la aĝo de 18 jaroj, kaj post unu jaro jam ekinstruis Esperanton. Li ŝatis kaj ĉiam emis instrui, organizi, kunigi homojn.

Ĉu ĉiuj ĉi tiuj ne estas trajtoj de vera esperantisto? Certe jes.

Mi konatiĝis kun Radojica antaŭ 30 jaroj, dum E-aranĝo, kaj ekde tiam estis klare, ke li emas agi, ne nur simple partopreni. Pro tio, eble, li estis estrarano de ILEI ekde 2001 ĝis sia forpaso.

Radojica ŝatis organizi aranĝojn, pro tio li estis ILEI-estrarano pri kongresoj, ŝatis gvidi, li estis prezidanto de ILEI, li emis aktivigi la instruan kaj sciencan agadon, li estis estrarano pri universitata agado.

Serbio kaj Rumanio estas najbaraj landoj, kaj li ofte partoprenis en niaj landaj aranĝoj. Ĉiufoje li prelegis dum la simpozioj, gvidis debatojn kaj atelierojn. Memorinda estas la ateliero *Per perloj al steloj!*, kiun Radojica gvidis dum la Internacia scienca kolokvo okazinta en 2016 en la Universitato de mia urbo Timişoara. Temis pri interesa metodo por progresa alproprigo de Esperanto helpe de E-kulturaj juveloj kaj interkulturaj spertoj en E-lernado, t.e. poemo, novelo, kanto, filmeto, faka artikolo k.s., ĉio en malstreĉiga maniero, do ne *per aspera ad astra,* kiel proverbis la romanoj, sed *per perloj al steloj*. Estas vera moto por inspiri ambicion kaj persistemon antaŭ la defioj de la instruado.

Kiel estrarano pri konferencoj, Radojica proponis al la Komitato, ke la *Konferenco* de ILEI fariĝu *Kongreso,* tiel ke la ILEI-aranĝo en Busano (Sud-Koreio) en 2017 estis la 50-a *Kongreso* de ILEI.

Radojica agadis Esperante dum preskaŭ ses jardekoj! Li ĉiam prelegis, instruis, debatis, gvidis, organizis, proponis, iniciatis, li *partoprenis* en la aranĝoj, ne nur *ĉeestis*.

Radojica restos en la memoro de esperantistoj, de kolegoj kaj kunlaborantoj, li lasis valorajn spurojn en Esperantujo, i.a. revivigante Esperanton en Serbio. Lia agado ne vane disŝaŭmiĝis.

Li mankos al ni ĉiuj…

Ni devas lerni „vivi” sen Renato, sen Rob, sen Radojica…

GONG Xiaofeng (Arko):

Kun profunda malĝojo mi eksciis pri la forpaso de Radojica PETROVIĆ. Kvankam la tempo, kiun mi havis la honoron pasigi kun li, ne estis longa, la rememoroj restas vivecaj kaj varmoplenaj en mia koro.

En 2011 li, kiel estrarano pri konferencoj de ILEI, venis al Ĉinio por esplori la preparojn de la 45-a ILEI-konferenco, planita por julio 2012 en Kunming. Antaŭ ol atingi Kunming-on, li vizitis la urbon Nanchang, kie mi loĝas kaj laboras.

Dum sia restado en Nanchang, mi invitis lin prelegi en Esperanto por studentoj de Nanchang-Universitato. Li ne nur prezentis la situacion kaj naturon de Serbio kun klareco kaj entuziasmo, sed ankaŭ inspiris per sia sincera intereso pri interkultura kompreno. En tiu momento, li ne estis nur gasto aŭ fakulo, sed homo, kiu sincere volis dialogi kun junuloj.



Li partoprenis ankaŭ en la 4-a Lushan-Forumo de Esperanto (*vd. la foton*), organizita de la Esperanto-Societo de Nanchang-Universitato kune kun la Jiangxi-a Esperanto-Asocio, kies prezidanto mi estis. Dum la interkona vespero, li libere miksis sin kun la studentoj: li dancis kun ili, ludis, ridis – kvazaŭ li estus unu el ili. Tia natura proksimeco forigis ĉiujn distancojn inter generacioj kaj kulturoj.

La sekvan tagon ni kune iris al la lago Poyang por observi migrantajn birdojn. En tiu trankvila pejzaĝo, lia amo al naturo kaj al vivo mem evidentiĝis same forte kiel lia sindediĉo al la Esperanto-movado.

Poste ni kune flugis al Artkolegio de Kunming por subskribi kontrakton.

Tie li montris sian kapablon ne nur kiel entuziasma movadano, sed ankaŭ kiel respondeca kaj kompetenta organizanto. La kontrakto estis subskribita, kaj komuna kompreno pri sukcese aranĝota konferenco estis atingita. Danke al lia kunlaboro, la preparado de la 45-a ILEI-konferenco progresis glate kaj la konferenco mem estis sukcese okazigita.

Poste la vojoj de nia kunlaboro daŭris. Ankaŭ mi eniris la estraron de ILEI kaj dum multaj jaroj ni laboris en la sama organizo. Ni kelkfoje renkontiĝis dum postaj ILEI-kongresoj en diversaj landoj. Tamen tiuj renkontiĝoj ĉiam estis tro mallongaj, mankis tempo por pli profunda interparolo.

Pli poste, pro la pandemio, la rektaj renkontiĝoj ĉesis kaj nia kontakto reduktiĝis al grupaj retmesaĝoj. La mondo kvazaŭ mallarĝiĝis kaj samtempe la distanco inter homoj iĝis pli sentebla.

Kun granda bedaŭro mi devas konfesi, ke mi ne povis vojaĝi al Beogrado por partopreni en la 58-a ILEI-kongreso, kies organizadon li respondece gvidis. Tio signifas, ke mi ne havis la ŝancon vidi lin ankoraŭ unu fojon – lastan fojon.

Dum tiuj jaroj de konateco kaj kunlaboro, mi profunde sentis, ke li estis homo varmkora, energia, kapabla kaj samtempe tre humila kaj facile alproksimiĝebla. Li sciis kiel komuniki kun studentoj, kiel instigi ilin kaj kiel krei etoson de amikeco kaj reciproka respekto.

Hodiaŭ, kiam li jam foriris de ni, restas ne nur lia laboro por Esperanto, sed ankaŭ tiuj simplaj, homaj momentoj – danco, rideto, komuna vojaĝo – kiuj vere montras, kiu li estis.

Vi forestas, sed via spirito restas inter ni. Ripozu en paco, kara Radojica.

Probal DASGUPTA:

La 10-an de marto mi aŭdis, ke ni perdis amikon Rade, Radojica PETROVIĆ, kiun mi ege amis kaj estimis.

Ĉu mi eĉ povas diri kiom multe mi lernis de Rade pri la pedagogio? Pri la forĝado de fortikaj rilatoj kun aliaj membroj de reta rondo, en kiu mi nun troviĝas? Pri la kaŝitaj fortoj kaj duonfortoj de Esperantujo? Pri la amikeco? Pri nia kapablo vidi glason kiel duone plenan kaj ne kiel duone malplenan? Pri ĉio kio valoras?

En funebra momento, oni volos aŭdi pri la faktoj. Mi komencu ĉe la

retlisto de IEK, la Internacia Ekzamena Komisiono de UEA kaj ILEI, al kiu oni aligis min baldaŭ post la jaro 2000. Mi sentis bezonon interveni en 2004-5 pri unu-du demandoj, kaj tiamaniere altiris la atenton de Rade, kun kiu pli frue mi havis nur supraĵan interkonon. Li lanĉis rektan konversacion kun mi, komencante ĉe la temoj, kiuj instigis miajn intervenojn kaj baldaŭ per apenaŭ rimarkeblaj gestetoj forĝis kun mi seriozan, personan ligon. Li proponis, ke mi kandidatiĝu por la prezidanteco de IEK. Mi konsentis, kondiĉe ke li kulise kunŝoforu kun mi. Li plenumis sian promeson tion fari. Mi ŝuldas al liaj tiamaj sugestoj la ekkapablon percepti subtilajn interpersonajn signalojn kaj personajn simptomojn priatentendajn, ne nur en tiu specifa rondo sed pli ĝenerale en Esperantujo – nia „familia rondo" bezonanta konstantan reforĝadon de tiuj fidindaj amikecoj, kiuj ebligas la moviĝadon de niaj unikaj horloĝeroj.

Kiam la respondeco ekprezidi UEA fortiris min de la IEK-prezida rolo, mi malkovris ke mi sukcesas trafunkcii dum ses jaroj la ĝisliman elprovon de ĉiuj miaj kapabloj ĉefe pro la lecionoj, kiujn mi enkapigis dum la metilernado sub la sentruda gvidado de Rade. Estis sendube helpe, ke la unua el la grandaj elprovoj post la eniro en la UEA-teamon koncernis la internacian pedagogion: mi enplektiĝis en la kunredaktado de la Esperanta versio de la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj de la Konsilio de Eŭropo. Nia teamo devis rapide produkti tiun libron sur kvalitnivelo sufiĉe alta por kontentigi la kribrontojn ĉe la Asocio por Lingvo-Testistoj de Eŭropo. Tio ke mi taŭge niĉis en la teamo, grandparte ŝuldiĝis al mia iniciĝo ĉe Rade, kvankam li mem neniel rekte kunrolis dum miaj UEA-jaroj.

Post tiuj jaroj, mi pasigis kun li vidalvide kunlaboran tempon dum restado en la Kastelo Grezijono en aŭgusto 2015. Ni kune skizis, kaj baldaŭ efektivigis, planon por lanĉi efikan landan sekcion de ILEI en Barato, gvidotan de nia komuna amiko Giridhar RAO, kiu jam delonge mem aktivis sur la lingvo-pedagogia tereno ĝenerale kaj tiu de ILEI tute konkrete.

De Rade mi ĉefe lernis la arton teni la propran personan rolon kiel eble plej kulise por ke la komunaj laboroj glate pluiru, por ke la institucioj restu „severe senpersonaj" kiel diradis Zamenhof, kaj tamen senteble havu komunan koron, kapablan efike kontribui al ĉies bonfarto ĝuste pro la interkoraj ligoj inter atentemaj kunlaborantoj.

Estimataj kolegoj en kaj ĉirkaŭ la Esperanta entrepreno – ĉe kies koro situas la pedagogio – omaĝe al la memoro de Radojica PETROVIĆ, ni trovu vojojn por plifortigi tiujn interkorajn ligojn.

Vicente MANZANO-ARRONDO (Viko):

Kara amiko Radojica,

Li silente rigardis la horizonton. Okuloj perditaj. Laca mieno. Ni estis ĉe la pinto de iu monteto de Ĉaĉak tuj post la finiĝo de la 52-a ILEI-Kongreso. Ŝajnas, ke tia sperto tro elĉerpigis lin. Mi rigardis la vizaĝon de tiu homo, kiu ekde la unua kontakto ĉiam montris energion, respondecon, altnivelan manieron kunlabori kaj serĉi garantion de bonaj rezultoj. Certe Radojica spertadis malfacilajn kunlaboradojn ene kaj ekster Esperantujo dum multe da jardekoj. Sed li ĉiam estis tie kaj tiel, kie kaj kiel Esperantaj defioj bezonis.

Mi ekkonis lin du jarojn antaŭe. Estis rapida enamikiĝo. Ambaŭ nature interkonsentis pri pluraj laboraj fadenoj kaj maniero rigardi la laboron por Esperanto. Ekzemple: oni varbu ne rekte, sed montrante ke Esperanto estas sukcesilo por pluraj defioj pli bone ol vendi ĝin pere de diskursoj; oni helpu junulojn kaj ekesperantistojn starigi projektojn, kiuj eble jam ekzistas, kiuj eble ne donos ion grandan, sed kiuj havas la kapablon energiigi ilin, ĉar propraj projektoj restigas kaj fortigas grupojn en Esperantujo.

Ni kunlaboris ofte. Ĉiam kaj sendube li estis neanstataŭigebla. Li ĉiam havis la mirindan kapablon rimarkigi tion, pri kio la ceteraj eĉ ne pensis. Kiam la grupo perdiĝas, Radojica helpas retrovi la vojon. Li neniam vendis fumon aŭ nerealigeblan projekton. Tiel, lia partopreno estis promeso de sukceso. Bedaŭrinde, radojiceco ne oftas kaj neniu sola homo povas garantii bonan rezulton per si mem.

Certe estas novaj esperantistoj, junuloj el diversaj kontinentoj, kiuj havas radojican sintenon. Estus bone teni la pordojn sufiĉe malfermitaj por ke ili eniru facile, sen malrespekteme ricevi ilin dirante „pli bone forgesu vian ideon kaj aldonigŭ al la mia”.

Kara kaj admirata amiko mia, Radojica, mi jam multe sopiras vin. Mi vidos vian seĝon malplena en pluraj kunvenoj, pensante „Se vi estintus ĉi tie...”.

Paderborna eksperimento kaj ĝia teorio kiel mankanta elemento por didaktiko de informacia epoko (III.)

de Ekaterina V. BEBENINA

Profesoro de Rusia Akademio pri Edukado, doktoro habilitita pri pedagogiaj sciencoj

Interfakeco kaj kaŝita transfero meritas esti konsiderataj ne kiel hazarda kromefiko de unuopaj sukcesaj fakoj, sed kiel grava didaktika principo. Se ekzistas lernobjektoj, kiuj plifaciligas lernadon de aliaj fakoj, tiam temas ne pri escepto, sed pri fenomeno, kiu povas esti esplorata kaj konscie projektata.

Esperanto estas unu el la plej klaraj ekzemploj de tia efiko. Ĝi videbligas tiujn trajtojn, kiuj kreas propedeŭtikan efikon, kaj tiel ili fariĝas modelo por pensado pri novaj metafakoj en lernejo kaj universitato.

La unua artikolo de la serio (IPR 2025/4) montris la propedeŭtikan efikon de Esperanto kaj klarigis ĝiajn empiriajn kaj teoriajn fundamentojn. La dua artikolo (IPR 2026/1) traktis lernadon kiel modeligeblan procezon en la kadro de kibernetika pedagogio kaj distingis inter manifesta kaj kaŝita transfero. La tria artikolo faras la sekvan paŝon: ĉu eblas konsideri tian efikon ne kiel hazardaĵon, sed kiel didaktikan leĝon, uzeblan por konscia kreado de novaj fakoj?

De ripetado al kaŝita transfero

Kaŝita transfero estas pli grava ol simpla ripeto, ĉar ĝi ne nur helpas konservi materialon, sed ankaŭ formas kapablojn, analizan pensadon, motiviĝon kaj memfidon. Ripeto tra aliaj fakoj malplialtigas forgesadon, plifortigas konservadon de la lernita materialo kaj kreas pliajn ligojn inter nocioj. Sed kaŝita transfero ne redukteblas nur al ripeto.

En kelkaj okazoj ĝi kondukas ne simple al pli bona konservado de jam lernita materialo, sed al pli rapida kaj pli profunda nova lernado. Antaŭe lernita fako komencas funkcii kiel kogna strukturo: ĝi donas al la lernanto manieron organizi scion, kiu helpas pli rapide kompreni novan fakon, vidi analogiojn, transdoni principojn kaj konstrui metafakajn ligojn. Alivorte, temas ne pri transdono de apartaj scioj, sed pri transdono de la maniero pensi.

La fenomeno de kaŝita transfero kongruas kun la ideoj de Jean Piaget [2], laŭ kiuj nova scio baziĝas sur jam formitaj kognaj strukturoj. Antaŭe lernitaj

manieroj pensi, skemoj kaj operacioj helpas pli rapide kompreni novan materialon, ligi ĝin kun jam konata enhavo kaj restrukturi propran sistemon de scioj. Similan logikon oni povas trovi ankaŭ ĉe Lev Vygotsky [2]: lernado estas la plej efika tiam, kiam ĝi apogas sin sur jam formitajn kapablojn kaj samtempe kondukas la lernanton en la zonon de la plej proksima evoluo. Samtempe la modeloj de Helmar Frank [1] ebligas priskribi tiajn procezojn kiel modeligeblajn kaj parte antaŭvideblajn.

Kaj ĝuste ĉi tie aperas la plej ambicia demando: ĉu eblas projekti fakojn — tute aŭ parte — tiel, ke ili havu similan „Esperanto-efikon"? Kaj ĉu modernaj teknologioj povos fariĝi la ilo, kiu transformos tiun ideon de teoria hipotezo al praktika didaktika instrumento?

Kial ĝuste Esperanto estas la ĉefa ekzemplo

Esperanto estas konata ekzemplo de fako kun propedeŭtika efiko [5].

Ĝia signifo estas determinita ne nur de tio, ke ĝi estas pli simpla ol multaj naturaj lingvoj. Pli grave estas tio, ke ĝi reprezentas funkciantan modelon de lingvo.

La gramatiko de Esperanto estas formaligita, travidebla kaj ne enhavas gramatikajn esceptojn. Dank'al tio lernanto pli rapide komprenas la ĉefajn principojn de lingva strukturo: vortfaradon, kategoriojn, sintaksajn rilatojn, regulojn de frazkonstruado.

Rezulte lernado de Esperanto ne nur donas scion pri la lingvo, sed ankaŭ faciligas lernadon de aliaj lingvoj.

Tio estas aparte videbla en situacio, kiam Esperanto fariĝas la unua fremda lingvo. Tiam ĝi funkcias kiel meza ŝtupo inter la spontana lingva sperto de infano kaj pli komplikaj fremdaj lingvoj.

Ĝuste pro tio Esperanto povas esti konsiderata kiel metafako: ĝi havas propran valoron, sed samtempe faciligas la lernadon de aliaj fakoj.

Vygotskij, Piaget kaj la logiko de kaŝita transfero

Kiel ĝenerala koncepto, transfero estis disvolvita de multaj sciencistoj, inter ili Edward Thorndike [3] kaj Lev Vygotsky [4].

La plej konvinkan teorian klarigon de la metafaka efiko eblas trovi ĉe Vygotskij. Vygotskij distingis inter ĉiutagaj kaj sciencaj konceptoj [6]. Ĉiutagaj konceptoj formiĝas spontane: infano iras de aparta al ĝenerala, de unuopaj objektoj kaj situacioj al pli vastaj kategorioj. Sciencaj konceptoj, male, estas formataj en la procezo de instruado: homo iras de ĝenerala al aparta, de abstrakta skemo al ĝiaj konkretaj manifestiĝoj.

Ĝuste pro tio strukturitaj fakoj havas apartan avantaĝon. Ili ebligas en konscio de lernanto formadon de stabila sistemo de rilatoj, kiu poste transferas al novaj kampoj.

En tiu senco Esperanto estas ne simple facila lingvo, sed sistemo, kiu faciligas la transiron de spontanaj konceptoj al sciencaj.

Laŭ Vygotskij „oni povas diri, ke la lernado de fremda lingvo levas la denaskan parolon de la infano al pli alta nivelo same, kiel la lernado de algebro levas aritmetikan pensadon al pli alta nivelo, ebligante kompreni ĉiun aritmetikan operacion kiel apartan kazon de algebra operacio kaj donante pli liberan, abstraktan kaj ĝeneraligitan, kaj tial pli profundan kaj pli riĉan rigardon al operacioj kun konkretaj kvantoj. Same kiel algebro liberigas la penson de la infano el la kaptiteco de konkretaj nombraj dependecoj kaj levas ĝin al la nivelo de plej ĝeneraligita pensado, tiel ankaŭ la lernado de fremda lingvo, kvankam per tute aliaj vojoj, liberigas la parolan pensadon de la infano el la kaptiteco de konkretaj lingvaj formoj kaj fenomenoj”. [6, 203]

Vygotskij aparte substrekis, ke lernado de fremda lingvo kaj formado de sciencaj konceptoj havas similan internan strukturon: en ambaŭ kazoj nova scio estas lernata ne per rekta rilato al la objektiva mondo, sed pere de jam ekzistanta sistemo de konceptoj.

Ĝuste pro tio fremda lingvo ne simple aldonas novajn vortojn, sed restrukturigas jam ekzistantan lingvan sistemon.

Ĉi tie aperas grava diferenco inter Piaget kaj Vygotskij. Piaget supozis, ke dum kreskado de infano sciencaj konceptoj anstataŭigas ĉiutagajn. Vygotskij, male, opiniis, ke fruaj strukturoj ne malaperas, sed transformiĝas.

Tio estas aparte grava por didaktiko: se fruaj strukturoj konserviĝas, tiam ju pli frue komenciĝas formado de sistema pensado, des pli forta estos la posta efiko.

Tial la demando pri aĝo akiras apartan signifon.

Post aĝo de 10 jaroj infanoj komencas pli aktive manipuli per abstraktaj kaj sciencaj konceptoj. Tamen tio ne signifas, ke antaŭ tiu aĝo instruado de sistema pensado estas senutila.

Male, se infano pli frue renkontas simpligitajn sed funkciantajn modelojn, tiam poste estas pli facile transiri al pli kompleksaj sciencaj strukturoj.

Sekve, la tasko de lernejo konsistas ne nur en transdono de apartaj scioj, sed ankaŭ en kreado de tiaj internaj modeloj, kiuj vastigas la zonon de la plej proksima evoluo. Vygotskij nomis zono de la plej proksima evoluo spacon inter tio, kion infano jam povas fari memstare, kaj tio, kion li kapablas lerni helpe de pli kompleksa sed alirebla modelo, instruisto aŭ medio.

Universitataj metafakoj

En lerneja edukado tiaj ekzempoj aperas relative malofte. Tamen en universitata edukado jam ekzistas fakoj, kiuj fakte plenumas la rolon de metafakoj.

En praktika inĝenierado al tiaj fakoj apartenas projektaj metodoj, metodoj de inĝeniera kreemo kaj sistemotekniko. En administra kaj politika regado - sistema aliro, politikologio kaj futurologio. En aplikataj sciencaj esploroj - imita modeligado kaj metodologio de eksperimento. Samtempe aperis ankaŭ teoriaj fakoj: sur la ĝeneralscienca nivelo - sistemologio, ĝenerala sistema teorio kaj organiza teorio; sur la naturscienca nivelo -kibernetiko kaj informadiko. En humanismaj studoj - retoriko.

La komuna eco de tiuj fakoj estas, ke ili ne estas limigitaj al unu sola faktereno. Ili estas formantaj universalajn manierojn priskribi, analizi kaj organizi kompleksajn sistemojn. Tial ilia studado faciligas la pluan lernadon de granda nombro da specialigitaj fakoj. Ĝuste ĉi tie videblas analogio kun Esperanto: same kiel Esperanto estas modelo de lingvo ĝenerale, tiel sistema analizo aŭ sistema teorio funkcias kiel modeloj de pli vastaj klasoj de agado.

Kiuj ecoj faras disciplinon metafako

Ne ĉiu plisimpligita modelo de scienco aŭtomate farigas metafako. Simpleco estas utila nur tiam, kiam ĝi konservas la internan strukturon de la objekto kaj ebligas tuj apliki ĝin praktike. Se lernobjekto restas nur aro de simpligitaj informoj, ĝi ne formas kapablojn, ne vastigas la zonon de la plej proksima evoluo kaj ne donas propedeŭtikan efikon.

Ĝuste tial por didaktiko gravas ne ajna modelo, sed funkcianta modelo. Tia modelo ĉiam estas pli simpla ol la originalo, sed samtempe konservas ĝiajn plej gravajn ecojn, inter kiuj estas finiteco, simpleco, proksimumeco kaj adekvateco. Modelo ĉiam estas pli simpla ol la originalo, sed ĝuste pro tio ĝi fariĝas taŭga por lernado: ĝia valoro konsistas ne en plena kongruo kun realeco, sed en tio, ke ĝi ebligas distingi la plej gravajn rilatojn kaj lerni labori kun ili.

Funkcianta modelo distingeblas per pluraj ecoj.

1. Ĝi havas propran praktikan valoron. Ĝuste tio distingas funkciantan modelon de abstrakta skemo: nefunkcianta modelo restas nur scio, dum funkcianta modelo fariĝas kapablo.
2. Ĝi konservas la strukturon de la koncerna kampo kaj formas kompreneblan metalingvon. En la kazo de Esperanto temas pri formala gramatiko, kiu ĝeneraligas la bazajn manierojn konstrui lingvajn strukturojn.
3. Ĝi enhavas minimuman nombron da hazardaj esceptoj. Ju malpli la sistemo dependas de apartaj kazoj, des pli facile lernanto povas transdoni ĝin al novaj kampoj.
4. Ĝi ebligas transdoni formitajn kapablojn al aliaj fakoj, faciligas la transiron de simpla al kompleksa kaj ebligas la pluan lernadon de pli malfacilaj fakoj.
5. Ĝi konstante referencas al ekzemploj el aliaj kampoj kaj tiel kreas interfakajn rilatojn.

Alivorte, gravas ne simple simpleco, sed simpleco, kiu konservas la strukturon kaj funkciadon de la modelo.

Artefarita intelekto kiel ilo de nova didaktiko

Ĝis nun multaj edukaj sistemoj, bazitaj sur artefarita intelekto faras plimalpli la samon: ili klarigas, kontrolas, testas, personigas la lernotempon kaj elektas ekzercojn. Tio jam estas grava, sed temas ĉefe pri helpo por pli efike instrui jam ekzistantan programon.

La teorio de kaŝita transfero metas alian taskon, gravas ne nur adapti pretajn kursojn, sed ankaŭ esplori ilian internan strukturon. Tio signifas serĉi kaŝitajn, metafakajn rilatojn, trovi „nodajn” konceptojn kun maksimuma propedeŭtika efiko, konstrui pli bonajn sinsekvojn de temoj kaj identigi tiujn fakojn, kiuj povas funkcii kiel metafakoj aŭ „kataliziloj” por plua lernado.

Antaŭe tia laboro estis tro plena da eroj kaj tre komplika por unu homo. Eĉ ene de unu sola fako estis malfacile konstrui optimuman sinsekvon de nocioj, dum kunordigo inter pluraj fakoj postulis tro grandan kvanton da mana laboro.

Modernaj komputaj metodoj povas esti utilaj kiel helpa ilo. Ili kapablas analizi la sinsekvon de lernotemoj, oftecon de ripetado, interfakajn rilatojn, metafakan efikon, tipajn erarojn kaj individuajn lernovojojn. Tio ebligas pli rapide kompari malsamajn variantojn de lernoprogramoj kaj kontroli, kiuj strukturoj evidentiĝas pli efikaj.

Tamen la decida rolo restas ĉe homo. La plej malfacila parto estas la formado de la logiko de la modelo mem: determini, kiuj strukturoj estas bazaj, kiuj transferoj estas necesaj kaj kiuj rilatoj vere funkcias. Artefarita intelekto povas rapidigi la analizon kaj komparon de variantoj, sed nur sperta pedagogo aŭ esploristo kapablas determini, kiu strukturo havas realan didaktikan signifon.

Konkludo

Esperanto pruvas, ke fako povas esti samtempe memstara, utila kaj propedeŭtika. STEM (kurso pri Scienco, Teknologio, Inĝenierarto kaj Matematiko) montras, ke interfaka aliro kapablas plialtigi intereson kaj efikecon de lernado.

Universitataj metafakoj demonstras, ke similaj mekanismoj jam ekzistas ankaŭ ekster la lingva sfero. Sekve, metafakeco kaj kaŝita transfero devas esti konsiderataj ne kiel aldono al tradicia didaktiko, sed kiel nova principo de projektado de disciplinoj. La perspektivoplena tasko de moderna pedagogio konsistas jam ne nur en priskribado de similaj efikoj, sed en konscia kreado de fakoj, kiuj enhavas ilin.

Referencoj

1. Frank, H., & Lobin, G. (1998). Lingvo-orientiga instruado –Klerigscienca kontribuo al la lingvokibernetiko interlingvistika /Sprachorientierungsunterricht – Ein bildungswissenschaftlicher Beitrag zur interlinguistischen Sprach-kybernetik. München: KoPäd.
2. Piaget, J. (1972). The epistemology of interdisciplinary relationships. Inter-disciplinarity: Problems of teaching and research in universities. – pp. 127-139.
3. Thorndike, Edward L. (1931): On the learning of rules in the study of a foreign language. En: THE GERMAN QUARTERLY, 4 (3), 89-95, Hoboken (NJ): Wiley.

4. Madella, A. (2024): Lev Vigotskji kaj dulingva edukado. En: Alessandra Madella (red.) Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-23. Pisa: Edistudio: 47-64.
5. Madella, A. (2023). Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj. Pisa: Edistudio. ISBN 978-88-7036-095-0.
6. Vygotskij, L. S. (1982). Pensado kaj parolo // Vygotskij, L. S. Verkoj en 6 volumoj / ĉefred. A. V. Zaporoĵec. — Moskvo: Pedagogika, 1982. — Vol. 2: Problemoj de ĝenerala psikologio. — p. 5-361.

Pretas la programo de la Kongreso kaj Simpozio 2026

de Alessandra MADELLA (Italio)



En la retejo www.ilei.info aperis la tuta bunta programo de la Kongreso kaj Simpozio de ILEI, al kiu jam aliĝis ĉirkaŭ 100 homoj kaj al kiu daŭre eblos aliĝi per favoraj kondiĉoj ĝis la fino de Aprilo. La 10-an de Julio dum la tuta tago funkcios registrado ĉe la 5-stela Hotelo Blue Horizon, proksime de la Nova Kampuso de Zaozhuang-a Universitato. Dume viglos programeroj por kapti la atenton de la loka loĝantaro (gazetara konferenco, malfermaj kursoj de Esperanto kaj ceremonio de arbo-plantado) kaj por interkonatigi la kongresanojn (bankedo kaj interkona vespero).

La matenon de sabato la 11-a, en la Nova Kampuso, ekos la tri-taga prelega parto de la Kongreso. Matene sin prezentos la aziaj sekcioj de ILEI. YAN Ming, vicrektoro de Hejlongjiang-a Universitato kaj la nova estro de la Ĉina Sekcio, gvidos ties kunvenon, al kiu sekvos la jam tradicia ILEI-Seminario en Orienta Azio. YU Jianchao, prezidantino de Pekina Eo-Asocio, prezentos en ĝi sian novan libron pri la fama instruisto Laŭlum, KITAGAWA Ikuko, prezidantino de Japana Eo-Instituto, prelegos pri la instruado de Esperanto en Japanio, dum LEE Jungkee, honora prezidanto de Korea Eo-Asocio, parolos pri la Seula Eo-Centro. La estroj de la Universitato ĉeestos dum la solena malfermo, al kiu sekvos la inaŭguraj prelegoj: Arko (GONG Xiaofeng) fokusiĝos pri la perspektivoj de reta instruado, dum Semio (SUN Mingxiao) ilustros la kongresan temon „Eduki profesiajn esperantistojn kaj protekti Esperanto-kulturon" per la ĉina modelo de Zaozhuang.

En la posttagmezo de sabato ekos la Simpozio de ILEI, kiu vidos entute la partoprenon de 24 profesoroj, doktoroj kaj fakuloj el 15 landoj el tri kontinentoj, kun la plej granda partopreno el Ĉinio, Japanio kaj Italio. La Simpozio daŭros unu tagon kaj duonon kaj esploros plurajn flankojn de la temo „Plialtigi lingvan konscion": de klasĉambraj strategioj al la rolo de literaturo kaj teatro, de la konscio pri lingvo diverseco en la mondo al la rolo de Esperanto en la disvolvo de metalingvistika kompetento. Kiel tradicie, unu kvarono de la prelegantoj estos ne-esperantistaj profesoroj, kies prelegojn ni interpretos al Esperanto, por vastigi la amplekson de niaj diskutoj kaj montri la taŭgecon de nia lingvo por la aktuala traktado de fakaj temoj. Ĉi jaron ili estos profesorino Rama MATHEW el Barato, engaĝita motoro de novaj pensoj pri lingvotestado en Azio, Julian E. PREECE, profesoro pri multlingva literaturo en Kimrujo, Paola BERTOLONE, profesorino pri Teatro de Universitato „La Sapienza" de Romo, la filozofo de sciencoj David J. DEPEW, unu el la ĉefaj fakuloj pri la retoriko de Darvino, kaj specialistoj pri la uzo de novigaj teknologioj en lingvoinstruado kiel Fatemeh MADISEH, Barbara LORANC, Iino ATSUSHI kaj Antje NEUHOFF. La Esperanta flanko estas same forta, gvidata de profesoroj kiel Bengt-Arne WICKSTRÖM, Ilona KOUTNY, KIMURA Goro aŭ A. Giridhar RAO. Interesajn diskutojn certe vekos la prelego de Ekaterina E. BEBENINA, kiu antaŭenpuŝos la novigan serion pri metalingvistiko, kiun la legantoj de IPR povis ĝui en la lastaj tri numeroj de la revuo. Al tio aldoniĝos prelegoj pri la historio de Esperanto-eksperimentoj fare de François LO JACOMO kaj Spomenka ŠTIMEC, pri ekzamenoj fare de Katalin KOVÁTS, pri literaturo fare de Sara SPANÒ kaj AIKAWA Takuya, kaj pri lingvo-diverseco en Ĉinio fare de PAN Zhongwu, YU Mei, TAN Zongqi kaj WEI Yongquan.

Estos parto de la Simpozio ankaŭ prezento de Bernhard TUIDER pri la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kiun eĥos dum la seminarioj de la tago poste SATŌ Ryūsuke pri la biblioteko de Japana Esperanto-Instituto kaj Semio pri la Muzeo de Zaozhuang-a Universitato. La 13-an vidos, fakte, du gravajn seminariojn. Matene, antaŭ la Solena Fermo kun la ĉeesto de la estroj de la Universitato, temos pri Esperanto instruado, kun kontribuoj de Laura BRAZZABENI, Anna STRIGANOVA kaj Dima ŜEVĈENKO, Patrick Aimé MANIRAKIZA, Tatjana LOSKUTOVA kaj LONG Yungxia (Nuba). Posttagmeze la kongresanoj iros al la Malnova Kampuso de Zaozhuang-a Universitato, kie troviĝas la Esperanto-Muzeo, por ĝin viziti kaj partopreni en seminario pri la „Protektado de Esperanto-kulturo", kun prelegoj de Semio, LI Bochuan (Briko) kaj YANG Fan (Jujuba). Entute la tritaga programo estos tre intensa kaj enhav-riĉa, trans generacioj, kontinentoj kaj Esperantujo mem. Kiel tradicie por la ILEI-kongresoj, la publiko, kiu ne sukcesos veni al Zaozhuang pro la malfacilaj kondiĉoj de nia mondo, povos spekti la programon hibride kaj estas poste planita eldono de la libro de la Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2025-2026.

En la retejo de ILEI jam troviĝas ankaŭ detala programo de la ekskursoj. Dum du-taga antaŭkongreso en Pekino eblos viziti la Malpermesitan Urbon (Imperiestran Palacon) kaj la Longan Muron. La tri tagoj de postkongreso portos nin al historiaj kaj naturaj vidindaĵoj de la regiono ĉirkaŭ Zaozhuang, de la naskiĝlokoj de Konfuceo kaj Mozi al la plej larĝa sensala lago de Norda Ĉinio al la antikva urbo Taierzhuang. Estos tre bona ŝanco malkovri parton de Ĉinio ne tiom konatan eksterlande, sed tre gravan pro la profundaj filozofiaj radikoj kaj por la moderna ekonomia disvolvo de la lando.

Ni kantu, kantu, ofte, kune, ni kantu!

En ĉiuj etnoj, gentoj, en la mondo homoj kantas, kantadas. Dum laboro, okaze de festo, dum diservo, okaze de funebro, sub duŝakvo…. Homoj parolas kaj kantas. Paroli estas fakte stranga maniero kanti. Kiel komunikis la prahomoj en la Prahistorio? Ĉu kantante, ĉu parolante? Kian povon havas la kantado? Kial ni kantas?

Feto perceptas sonojn. Feto sentas la voĉon de la patrino. Tio okazas ekde la 16-a semajno de la gravedeco. Post la naskiĝo komenciĝas tre valora komunikado inter la patrino kaj la bebo, dum mamnutrado kaj ĝenerale tra la tagoj; en tiuj momentoj la patro ankaŭ kontribuas al „duŝado" de la bebo per

sonoj, silaboj, de iuj lingvoj kaj de kantoj. En ĉiuj etnoj oni kantas por bebo; tio efikas kuraĝige. Beboj ŝatas aŭdi kantojn, beboj estas pli feliĉaj, kiam iu kantas al ili rigardante ilin. Tiaj komunikaj momentoj inter gepatroj kaj bebo estas tre-tre gravaj: ili kontribuas al evoluigo de la cerbo, de la intelekto de la bebo. Gepatroj! Lasu for vian poŝtelefonon kaj koncentriĝu ĉe via ido! Duŝu rin per rakontoj, kantoj, voĉa io, ridetoj kaj amoplenaj rigardoj! Ĉu la bebo ion komprenas? Forgesu tiun penson! Ne gravas.

Kiam mi estis en Japanio, okazis, ke mi vizitis familion kun bebo. Mi portis la bebon kaj kantis, kompreneble en mia lingvo la franca, kantetojn por beboj. La japana bebo ridetis kaj ĝuis. Tia kontakto gravas. En tiuj momentoj la bebo kaptas, ke iu estas ĉe ri, kun ri, je dispono. Kadre de tiaj ĉiutagaj kontaktoj inter la gepatroj kaj la bebo, tiu etulo aŭdos la paroladojn en la patrina lingvo, en la patra lingvo, en la gepatra lingvo, kaj komencos eldoni sonojn, iujn sonojn, per sensignifaj silaboj. Iu bebo kapablas eldoni sonojn, kiuj apartenas al la ĉina lingvo aŭ sonojn klakajn el iuj sud-afrikaj lingvoj. Se hazarde la bebo prononcas ian silabon aŭ silabgrupon, kiu similas al iu el la familiaj lingvoj aŭdataj, ri ricevos ridetojn kaj aplaŭdojn de la gepatroj, kaj ri ripetos la sonojn por vidi pli da ridetoj kaj aŭdi pli da aplaŭdoj, kaj tiel iom post iom akiros la endome uzatajn lingvojn. Tre grava komunikado. Tiel la bebo iom post iom akiros lingvojn kaj la cerbo de tiu etulo konstruos la komprenon de la ĉirkaŭaĵo per nomado de aĵoj, koloroj, diversaj ecoj.

Homoj pagas altajn sumojn por iri al koncertoj, por aŭdi muzikon aŭ kantadon. Oni ĉefe ŝatas aŭskulti kanzonojn. Korusoj floras. En la cerbo ekzistas preciza zono por kantanta voĉo. La enhavo de la kanto ne tiom gravas. La cerbo havas alian zonon por kapti la paroladon. En la muziko estas melodio, ritmo, longaj aŭ mallongaj notoj. En parolado ankaŭ estas melodio kaj ritmo, sed ne okazas ripetado kiel en kantado, ne estas strukturo. Kanto havas ripetadon kaj strukturon. Fakte la limo inter parolado kaj kantado ne estas preciza. La cerbo ne traktas same la paroladon kaj la kantadon, tiuj elkodigadoj okazas en malsamaj cerbaj zonoj. Por bazaj informoj parolado estas pli rapida kaj pli efika. Kiam ni kantas, la korpo produktas hormonojn de feliĉo. Tio efikas simile al drogoj. Kantado esprimas amon, tristecon, emociojn, sentojn, … ĉu kantado estas kuracilo? Kantado ligas. En vilaĝoj, festoj, kantado estas socia cemento.

Kio aperis unue? Biologio aŭ kulturo? Eterna demando pri kokino kaj ovo. Unue la bebo uzas aeron per siaj pulmoj. Ri produktas melodiojn,

parolado venas poste. „Muzilingvaĵo” (musilangage) estas nomo donita al tiu stadio antaŭ la apero de silaboj kun signifoj.

En la historio de la Tero birdoj aperis longe antaŭ homoj. Birdoj kantas. La cerboj de birdoj iom similas al tiuj de homoj. Ĉu homoj komencis imiti birdojn kaj unue kantis por komuniki? Ĉe la kantantaj birdoj oni povas observi, kiel la gepatroj instruas la kantadon al siaj idoj. Eble okazas la samo ĉe balenoj… Aliaj birdoj kaj bestoj blekas sen lernado. Ĉe birdoj kantado ĉefe utilas al alvoko al malsamseksa kunulo cele al reproduktado. Ĉu tio ekzistas ankaŭ ĉe homoj?

Sciencisto Forman esploris en tiu direkto. Li konstatis en koncertoj, ke virinoj pli aŭskultas virajn voĉojn; ilia cerbo reagas alimaniere en tia situacio. Same ĉe viroj. Oni povas dedukti, ke homo ankaŭ kantas por altiri partneron.

Kanti kontribuas al bonfarto. Homoj kantas koruse. Birdoj ne kantas koruse. Kanti koruse kreas socian ligon. Kantante oni ĉion forgesas. Mankas spaco por konfliktoj. Kantante la korpo produktas hormonon endorfino, same kiel en dancado, ridado, komunaj manĝoj kaj aliaj pozitivaj aktivaĵoj… Temas pri bazo por sociaj ligoj. Kantado plifortigas la imunsistemon, la korusa komuna ritmo malaltigas la hormonojn de streĉigado. En Britio en iu prizono (aŭ en ĉiuj?) malliberuloj kune kantas. Oni observis, ke post liberiĝo ili plu kantas, temas pri sento de aparteno. Kiam oni koruse kantas, oni ne rigardas la aliajn. Ne gravas, ĉu iu ĝuste aŭ malĝuste kantas. Naskiĝas sento de aparteno, de aneco.

Jen estas miaj notoj post spektado de filmo en televido ĉe ARTE dimanĉe unuan de februaro 2026. En serio „*La réponse à presque tout*” (respondo al preskaŭ ĉio) numero 42.

Kiel instruisto mi aldonu, ke sciante tion, ni praktiku kantadon en niaj lecionoj! Nun ni povas imagi, kiajn avantaĝojn ni atingos per kantado. En vilaĝoj, festoj, kantado estas socia cemento. Certe ankaŭ en niaj klasoj. La frazoj de kantoj restos en la memoro, do frazmodeloj, strukturoj, firmiĝos en la cerbo. Se ni povas prezenti kantojn kun prilingva enhavo, la lernado estos ekstreme efika: a b c… ekzistas en kanto, ĉu aliaj kantoj ekzistas? Ĉu iu komponos kanton pri la finaĵo - N?

Mireille GROSJEAN

Benino

Lerneja agado en Benino (resumo de jarfina raporto)

En decembro 2024, la alfabetiga kampanjo kaj la Esperantaj agadoj por la lerneja jaro 2024–2025 estis oficiale lanĉitaj ĉe la Ŝtata Mezlernejo n-ro 1 en Lokossa, sub la superrigardo de la respondeculo pri alfabetigo kaj antaŭenigo de naciaj lingvoj, reprezentanta la Departementan Direktoron pri Meza, Teknika kaj Metia Edukado. La lanĉo sekvis la rajtigon donitan al la NRO Infanoj Ĉirkaŭ Afriko instrui Esperanton kiel laŭvolan fakon kaj proponi enkondukan legopovan trejnadon en beninaj naciaj lingvoj en mezlernejoj de la Departemento Mono. La projekto jam komenciĝis dum la lerneja jaro 2023–2024 ĉe la porknabina liceo en Lokossa kaj vastiĝis la sekvan jaron al la Ŝtata Mezlernejo n-ro 1.

En decembro 2025 okazis premio-disdonaj ceremonioj respektive en la porknabina liceo kaj en la Ŝtata Mezlernejo n-ro 1 en Lokossa. Ambaŭ ceremoniojn gvidis la reprezentanto de la Departementa Direktoro pri Teknika, Meznivela Edukado kaj Metia Trejnado de Mono. La eventoj sekvis la jarfinajn ekzamenojn: en Esperanto (7-a de junio 2024) kaj en Esperanto kune kun du beninaj naciaj lingvoj (28-a de majo 2025).

Laŭ la oficialaj rezultoj, entute 88 lernantoj sukcese trapasis la ekzamenojn. Al ĉiuj sukcesintoj estis enmanigitaj partoprenatestoj, kaj 20 lernantoj ricevis specialajn premiojn. La atestiloj, subskribitaj de la Departementa Direktoro, atestas partoprenon en la unua lernostadio kaj instigas la lernantojn daŭrigi la studadon ĝis pli alta nivelo – klara signo de oficiala subteno al Esperanto.

La premioj konsistis el lernejaj iloj (kajeroj, skribiloj, krajonoj, matematikaj ilaroj ktp.). Krome, disdoniĝis diversaj propagandaj Esperantaĵoj, interalie poŝkalendaretoj donacitaj de Bert SCHUMANN kaj materialoj donacitaj de Zsófia KÓRÓDY; glumarkoj kaj la revuo *Espéranto-info* kompletigis la disdonon.

La premio-ceremonioj celis kreskigi konkuremon inter la lernantoj kaj pozitive influi la ĝeneralan publikon. Ili okazis kadre de tradicia flag-leviga ceremonio, kun partopreno de la lerneja administracio, instruistaro kaj lernantaro, kaj markis samtempe la finon de la kampanjo 2024–2025 kaj la lanĉon de la nova kampanjo 2025–2026.

Statistikoj pri la premiitoj

- Porknabina liceo Lokossa: 14 premiitoj (Mina 3, Fonua 3, Esperanto 8)
- Ŝtata Mezlernejo n-ro 1 Lokossa: 6 premiitoj (Fonua 4, Esperanto 2)

Por pliaj informoj kaj eventuala subteno: Latifou GBADAMASSI, BP 302 Lokossa (Mono), Respubliko Benino, *latifougbadamassi@yahoo.fr* aŭ *infanojcxirkauxafriko@gmail.com.*

Germanio

SEP-11 – Somera Esperanto-Perfektigo

1-semajnaj intensaj lingvokursoj en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo (17.-24.07.2026 kaj 2. 24.-31.07.2026)

Ambaŭ semajnoj: por komencantoj (A1-A2) por progresintoj (B1-B2) por instruemuloj (B2-C1) klerigsesioj por instrukapabligado kun observado, konsilado, provinstruado! Gvidantoj: Zsófia Kóródy, Peter Zilvar, kunlaborantoj de Esperanto-Centro Herzberg

Ĉiutage: 6 instruhoroj, Posttagmeze: urborigardo, ekskursoj, naĝado, biciklado, promenado, festoj ktp. Vespere: filmoj, muziko, ludoj, babilado, literaturo, ekskursoj, rostadfesto.

Specialaj ofertoj en la dua semajno: festo okaze de la 20-jara jubileo de Herzberg kiel Esperanto-urbo, kunvetureblo al UK en Graz, Aŭstrio.

Kurskotizoj: 1 semajno 190 €, 14 tagoj = 320 €, rabatoj por studentoj, GEA-membroj ktp. Ni helpas al vi trovi favoran tranokteblon *(*kostoj: persono/nokto)

1) Favorpreza Esperanto-tranoktejo 35 €
2) Privata apartamento (se min. 2 personoj) ĉ. 45 €
3) En propra tendo senkosta
4) Hotelo (3-4 stela) laŭ individua mendo

Organizanto: *Esperanto-Centro, DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6. Aliĝo, detaloj: esperanto-zentrum@web.de, Tel.: 0049-5522-5983 aŭ 0049-160-98754190 (ankaŭ Whatsapp)*

Italio

Esperanto-kurso en lernejo en Riva del Garda (Trento)

En la „Scuola Parentale Creativity Garden" de Riva del Garda (Trento), en februaro 2026 finiĝis kurso pri Esperanto gvidata de Gianantonio Pfleger. Malsimile al multaj eksteraj aktivecoj, tiu ĉi kurso okazis dum la regulaj lernejaj horoj, kio substrekas la edukvaloron de la lingvo por la lernejo.

Daŭro: 20 horojn da intensa kaj ludplena lernado. Partoprenantoj: 19 geknaboj inter 9 kaj 12 jaroj. Je la fino, ĉiu lernanto ricevis oficialan partoprenatestilon eldonitan de Itala Instituto de Esperanto (IIE).
La lernantoj montris grandan intereson kaj entuziasmon, kio instigis la lernejon jam plani la estontecon. Pro la sukcesaj rezultoj, la lernejo proponis daŭrigi la kurson venontjare. La celo estas klara: atingi la nivelon A2 kaj doni al la geknaboj la eblecon trapasi oficialan ekzamenon pri lingva kompetento. Ĉi tiu iniciato pruvas, ke Esperanto estas viva kaj utila ilo por malfermi la mensojn de la plej junaj generacioj al internacia komunikado.



Transjara KursKunveno (TKK) „Etsu Nen”, valora japana kutimo ekzemplodona por ni ĉiuj

Enkonduko de Mireille GROSJEAN

越 年

Tiu kutimo aspektas tiel: la apero de la nova jaro devas trovi nin en praktiko de nia lerncelo, studobjekto. Por mi estis siatempe aikido: nia japana majstro organizis kurson la 31-an de decembro je la 22-a horo, kaj tiu trejnado daŭris ĝis la unua de januaro je la 2-a horo matene. Sekvis granda festo kaj manĝo. Ĉe Oomoto en Kameoka, Japanio, la Transjara KursKunveno komenciĝas

eble la 30-an de decembro kaj daŭras ĝis la 2-a aŭ 3-a de januaro kaj kompreneble okazas lerncela aktiveco en la preciza momento de la jarŝanĝo. Mi partoprenis kaj instruis en tiu TKK en Kameoka en la jaroj 2008-2009 (*https://mirejo.blogspot.com/2009/01/kameoka-oomoto/html*). Tia kunveno nomiĝas **GASSHUKU 合宿;** laŭ tiu koncepto personoj kunvenas por kune studi kaj/aŭ labori, manĝante la saman rizon kaj dormante sub la sama tegmento. Tre efika lerneblo, komuna momento kun altnivela rezulto.

Svisa Esperanto-Societo (SES) organizis staĝon **Etsu Nen** en 2023 kaj la tritaga kunveno okazis ĉe mi kun 7 personoj. Sukcesa kurso. Se SES volas ripeti tiun sperton, ĝi devas trovi pli grandan lokon.

En Japanio multaj esperantistoj veturas al Kameoka, apud Kyoto, por bone studi kaj progresi en la lingvouzo. Fine de 2025 du junaj esperantistinoj povis okaze de tiu decembrofina staĝo komenci mem instrui, kaj iliaj spertoj aperas detale en du interesaj tekstoj. Jen ili. Tiuj raportoj aperis en la revuo de Oomoto „Nova Vojo" numero 2026/3.

Retrorigardinte la Transjaran Kurskunvenon

de OZASA Rjota



La Transjara Kurskunveno okazis dum tri tagoj, de la 31a de decembro 2025 ĝis la 2-a de januaro 2026, en la ĉefsidejo de Oomoto en Kameoka.

Ĉi-foje mi respondecis unuafoje pri elementa klaso por koreaj lernantoj. La nombro departoprenantoj estis naŭ. Kvankam mi sukcese trapasis la ekzamenon de EPA (Esperanto-Populariga Asocio) por gvidanto en septembro 2025, mi lernis Esperanton ankoraŭ nur malpli du jarojn kaj konsciis pri mia manko de sperto. Krome, instrui Esperanton en la korea estis tute nova sperto por mi. Do komence mi estis plena je timo kaj maltrankvilo.

En la unua tago ni komencis per sinprezentadoj kaj lernis bazan Esperantan gramatikon. Mi miris pro la rapida kompreno de la lernantoj. Pli bone ol mi imagis. Antaŭ ol veni al Japanio, ili jam studis Esperanton dum ĉirkaŭ du monatoj, kio ree montris al mi la diligentecon de koreaj lernantoj.

Ekde la dua tago ni lernis Esperanton serioze per la lernolibro *New Express*.

Dum paŭzo mi rakontis, ke en mia universitato Doŝiŝa, troviĝas monumento de la poeto Yun Dong-ju. Tiam la lernantoj diris: „Ĉar ni venis ĝis Japanio, ni volas nepre viziti tien.” Kvankam ŝanĝi la horaron ne estis ideale, ni havis sufiĉan tempon pro la progreso de la lecionoj. Do organizanto de kurskunveno permesis la viziton, kondiĉe ke ĉiuj iru kune.

Tamen, mi forgesis, ke estis novjara tago, kaj la universitato estis fermita pro la vintraj ferioj. Post veturado per JR kaj metroo de Kameoka, ni alvenis al la stacio Imadegaŭa ĉirkaŭ je la 17-a horo. Jam estis mallume, kaj la pordegoj estis fermitaj.

Ni troviĝis en senelira situacio. Mi senkuraĝiĝis, pensante ke mi ne povos montri al ili la monumenton malgraŭ la longa vojaĝo. Sed en la proksima gardejo ankoraŭ lumo estis. Montrante mian studentan karton, mi demandis, ĉu eblos eniri en la kampuson dum mallonga tempo. Feliĉe la gardisto afable konsentis.

Danke al tio ni povis viziti la monumenton en preskaŭ tute malplena kampuso. Antaŭ la ŝtono ni laŭtlegis la faman poemon „序詩（Seosi）” de Yun Dong-ju. Vidi iliajn kontentajn vizaĝojn estis por mi la plej granda ĝojo.

Post vespermanĝo ni revenis al Kameoka jam post la 20-a horo, sed ni ankoraŭ studis Esperanton unu horon pli, kaj tiel finiĝis la tago.

En la tria tago ni daŭrigis la lernadon per *New Express*, kaj fine mi petis la lernantojn verki siajn impresojn pri la Kurskunveno en Esperanto. Ĉiuj sukcesis skribi en Esperanto, kio montris kiom multe ili lernis dum la tri tagoj.

Je la 11-a horo okazis la ferma ceremonio, en kiu unu persono el ĉiu klaso prezentis sian impreson en Esperanto. S-ino Vena reprezentis mian klason.

Ŝi diris: „Per la elementa klaso de Esperanto mi lernis multe kaj sentis min pli progresa. Ĉi tiu kurso donis al mi multajn ĝojojn kaj belajn memorojn.”

Post ŝia parolado la ĉambro pleniĝis je ĝojaj krioj kaj aplaŭdoj. Eĉ nun, post unu monato, mi ankoraŭ ne povas forgesi tiun momenton.

En la TKK Unuafoje Kiel Gvidantino 「越年での初講師」

ŬATANABE Saki

Mi tre ŝatas la Transjaran Kurskunvenon de EPA, ĉar ĝi estas la evento, en kiu mi povis senti la ĝojon lerni Esperanton kaj la varman koron de esperantistoj.

Mi unuafoje partoprenis en ĝi, kiam mi estis en mia tria jaro en la universitato. Tiutempe mi ankoraŭ nenion sciis pri Esperanto, sed dum la kursoj mi iom post iom komprenis vortojn kaj frazojn per Esperanto kaj sentis grandan intereson. La esperantistoj estis tre afablaj al mi, kvankam mi ne povis bone paroli, kaj pro tio mi ekvolis daŭre lerni Esperanton.



Ĉi-jare en la Kurskunveno mi unuafoje servis kiel gvidantino. Mi respondecis pri klaso por infanoj de 11-jaraj ĝis 15-jaraj. Mi uzis vort-ludojn ktp en Esperanto, por ke la infanoj povu senti: „Mi sukcesis ekmemori! Estas amuze!” Rezulte, ĉiuj aktive partoprenis en mia kurso.

Vidante la infanojn rideti pere de Esperanto, mi sentis, ke ĉi tiu lingvo ligas homojn. Eĉ infanoj, kiuj neniam lernis Esperanton antaŭe, memvole demandis: „Gvidantino, kion signifas ĉi tio?” Tio tuŝis mian koron.

Tra tiuj tri tagoj mi rimarkis, ke mi ŝatas instrui kaj transdoni ion al aliaj. Se la infanoj eĉ iom plu daŭrigos lerni Esperanton, tio estos por mi granda ĝojo.

KOLOKVO PRI PEDAGOGIO FREINET la 8an de februaro 2026 en La Ciotat (Francio)

Tiu „moderna” pedagogio naskiĝis en la tridekaj jaroj kaj forte distanciĝas de tradicia edukado. Ĝi estis pripensita de juna instruisto, Célestin Freinet (frene'), ĝi celas sukcesigi la lernanton per naturaj metodoj. Oni ne lernas paŝi se oni ne paŝas: infano provas paŝi, falas, rekomencas. Same pri parolado: infano ne celas prononci silabojn aŭ vortojn sed komuniki kun la aliaj, kaj tiel certigi sian povon! Freinet konstatis, ke lernantoj enuas ne ĉar ili devas labori, male, ili enuas, ĉar ili ne laboras. Sekve necesas laborigi la lernantojn, kaj motivigi ilin; la lernantoj mem elektas sian laboron, esplorante la vojon kaj forĝas sian animon.

Kiu estas Célestin Freinet (1896-1966)?

Li naskiĝis en vilaĝo, sude de Francio. Lia patrina lingvo estas la regiona, la provenca. Li vizitis vilaĝan lernejon, kie oni instruis sen libroj. La instruisto mem kreis resumojn kaj la lernantoj devis ilin kopii kaj poste ripeti. Li eniras pedagogian seminarion, iĝas instruisto en baza lernejo: tie li

konstatas, surbaze de agrikultura vivo, ke ne eblas „trinkigi azenon, kiu ne soifas", „ne ĉiuj iras laŭ la sama vojo", „agloj ne supreniras laŭ la ŝtuparo, sed rektas supren". Komenciĝas la unua mondmilito, li soldatservas, batalas, estas vundita. Reveninte 70 % handikapite, li ne plu povas paroli, sed tamen ŝatos plu instrui. Li do esploras aliajn instrumetodojn en aliaj eŭropaj landoj, legas la tiamajn grandajn pedagogojn (ekz. Piaget), konatiĝas kun la superrealistoj kaj konkludas, ke la plej bona sistemo lerni estas la eksperimento kaj poioma progreso. En 1920, li ricevas postenon en Bar sur Loup (norde de Nico), en 1928 en Saint-Paul de Vence, kie li fabrikas ilojn por sia pedagogio, organizas sian klason laŭ siaj ideoj malgraŭ la atakoj. Lernas Esperanton.

Kio estas lia „moderna pedagogio"?

Daŭre hodiaŭ ĝi estas moderna: la instruisto ne alvenas kun tutpreta kurso, sed pretas improvizi surbaze de la deziroj de la lernantoj, kiuj proponas temon laŭ la politikaj eventoj. Li do devas adaptiĝi: mi memoras esperantistinon el mia urbo, ŝi veturas al la lernejo kun ruliĝanta korbo, kiun dommastrinoj uzas por viziti la bazaron kaj fari aĉetadon. En la korbo estas diversaj dokumentoj, libroj, fotoj ktp. La lernantoj estas en la centro kaj ekspluatata estas ilia kreemo. En la klaso estas biblioteko, kaj la lernantoj sen permeso leviĝas por iri tien serĉi la materialon, kiun ili bezonos por prelegeti al siaj samklasanoj. La infanoj preparas murgazetojn aŭ printas klasan gazeton. Libera esprimiĝo estas la ĉefa moto: laŭ Montaigne, prefere forĝi sian animon ol plenigi ĝin: infano ne lernos se li ne komprenas la celon. La instruisto ne estas la ĉefo, ne staras sur podieto, sed estas samnivela kun la lernantoj. La tabloj ne vicas antaŭ li, sed prefere U-forme por faciligi la dialogon, la intervenojn ktp. Vi konstatas, ke multo el la ideoj de Freinet iĝis aktuala pro la esploroj de neŭrosciencoj. Tre amuzis min afiŝo en la necesejoj de fakultato en Nancy (orienta Francio) „Jara defio 2025-2026: lavi siajn manojn per malvarma akvo". Tion jam diris Freinet en 1930: ne necesas lavi la manojn per varma akvo, do estu nur unu krano en la lernejo kun malvarma akvo!

Kiel fartas Pedagogio Freinet en Francio?

Se ekzistas bazaj lernejoj en pluraj urboj, estas nur du mezgradaj lernejoj (collèges) en Francio, unu en mia urbo La Ciotat. Normale, la lernintoj laŭ Freinet havu la eblecon daŭre lerni en Lycée Lumière (laŭ la nomo de la inventintoj de kino fratoj Lumière, kun unua filmo „Alveno de trajno en la stacidomon de La Ciotat"), sed tio ĝenas (ili devus lerni 3 jarojn kun la samaj

instruistoj), kaj la lernejestrino decidis nuligi la Freinet-klason. Evidente protestas la gepatroj, la kolegoj, sensukcese, eĉ se la kontrakto estas triopa (lernejo, akademio, departamento).

Pedagogo Retine estas la sola, kiu kuraĝas instrui Esperanton, ne oficiale sed ĉar internacia korespondado estas rekomendita, kiel korespondi kun Brazilo aŭ Japanio? (tra traduko en Esperanton); aŭ en muziklecionoj, lerni kanzonojn por grandigi interkulturon. Tiel oni konstatas, ke lernantoj laŭ Freinet pedagogio scias pri Brazilo. ke ne estas nur futbalo kaj Karnavalo!

Kiaj diferencoj inter lernintoj laŭ Freinet kaj aliaj?

Ĉefe rimarkindas diferencoj en la parolado (kvankam en la abiturienta ekzameno estis enkondukita t.n. „granda parola parto", por kiu lernantoj preparas prelegon pri iu elektita de ili temo). Ofte tiaj lernintoj iĝas klasdelegitoj. Mi povas doni ekzemplon de unu lernanto mia, kiu komencis paroli en la kurso de Esperanto, poste intervenis en la kurso de rusa lingvo, poste miaj kolegoj rimarkis, ke ankaŭ en iliaj kursoj li iĝas pli kuraĝa por interveni parole .... li iĝis deputito! Do fakulo pri paroladoj!

Du francaj filmoj estas dediĉitaj al la vivo de Freinet: „Ecole Buissonnière „(1949) de Jean-Paul Le Chanois kun Bernard Blier, kaj televidfilmo preparita kun la helpo de geedzoj Gente, esperantistoj el Avinjono, kiuj persone konis Célestin Freinet.

Branĉo de ILEI, ICEM-Esperanto (Internacia Celado por Edukado Moderna per Esperanto) ekzistis antaŭ jaroj, ŝajne nun vere lamas. Do ek!

Renée TRIOLLE, triolle.renee@wanadoo.fr

Instruado de Esperanto en japanaj universitatoj: spertoj, defioj kaj malkovroj

de TIDA Syuntaro, Universitato de Kioto (Japanio)

1. Universitato de Kumamoto

En la jaro 2011, mi estis unuafoje plene dungita kiel universitatata instruisto. Mia ĉefa tasko tie estis instrui lingvistikon kaj la korean lingvon. La Universitato de Kumamoto estis sufiĉe granda institucio kun 7 fakultatoj kaj ĉirkaŭ 9 500 studentoj entute (pli ol 7 500 en la bakalaŭra programo kaj pli ol 1 800 en postdiplomaj programoj). Tamen, en la fakultato de prihomaj

studoj, kie mi instruis, estis proksimume 770 studentoj, kaj el ili nur ĉirkaŭ 15 elektis studi lingvistikon.



Por ĉi tiuj studentoj, mi ne volis fari prelegojn nur pri tro abstraktaj lingvistikaj teorioj. Anstataŭe, mi deziris trakti „ekzotajn lingvojn" – lingvojn pri kiuj la studentoj ne havas sufiĉan antaŭan konon – kaj diskuti pri iliaj gramatikoj. Esperanto perfekte taŭgis por ĉi tiu celo, parte pro sia tiel nomata artefariteco. Tial mi utiligis la kadron de „faka prelego pri lingvistiko" por instrui pri Tokpisino, Esperanto kaj la Dom-lingvo, instruante po unu lingvo en ĉiu jaro. Atentinde, ĉi tio ne estis simpla lingvokurso, sed faka studo specife celita al studentoj de lingvistiko.

En la unua jaro, mi instruis Tokpisinon. En la unua semestro mi prezentis la bazan gramatikon, kaj en la dua semestro mi profunde traktis lingvistikajn problemojn. Tiu kurso fariĝis granda sukceso, grandparte ĉar mi hazarde renkontis Papuo-Novgvineanon en loka poŝtoficejo, kaj ŝi kun sia edzo ofte vizitis la klason. Mi sentis min vere kontenta pri ĉi tiu sperto. Tamen, en la dua jaro, kiam mi instruis Esperanton por la unua fojo en mia vivo, la situacio tute ŝanĝiĝis. Mi baldaŭ rimarkis, ke mi ne estas tiel sperta pri Esperanto kiel pri Tokpisino aŭ la korea. La studentoj komencis plendi, ke la prelego progresas tro rapide kaj ke Esperanto estas malpli facila ol Tokpisino. Tio fariĝis tre amara sperto por mi.

Tiu ĉi malfacileco havis strukturajn kaj sistemajn kialojn. Esperanto havas multajn trajtojn, kiuj mankas en la japana, la korea aŭ Tokpisino, sed kiuj ekzistas en la angla kaj aliaj eŭropaj lingvoj. Ekzemple, la distingo inter tro multaj frikativoj kaj afrikatoj, kompleksa silaba strukturo, la gramatika nombro (singularo kaj pluralo), la sistemo de tabelvortoj, la duobla funkcio de ki-vortoj (demanda kaj rilata), la distingo inter genroj de pronomoj por la tria persono (li, ŝi, ĝi), la diversaj strategioj por marki posedanton, la distingo de prepozicioj, kaj almeto de demandaj vortoj al la komenco de frazo. Ĉar tiuj konceptoj estis tute fremdaj al la japanaj studentoj, mi preskaŭ ĉiam devis ripeti al ili: „Rememoru la anglan gramatikon". Kompreneble, tio ne estis tre plezura maniero por instrui aŭ lerni, kaj la studentoj tute ne ŝatis ĝin. Mi eĉ dirus, ke lerni Esperanton povus plibonigi ilian scion pri la angla, sed mi ne tro emfazis tion, ĉar tio ne helpis mildigi la situacion.

Krome, la dua grava problemo estis mia instru-metodo. Mi faris la eraron ofte faratan de multaj averaĝaj lingvistoj: mi tro multe fokusiĝis pri la abstrakta gramatiko kaj tute ignoris la sociajn, kulturajn kaj historiajn aspektojn de la lingvo. Mi tute ne parolis pri la esperantista komunumo, kvankam Esperanto estas ne nur planita lingvo, sed ankaŭ efektive uzata socia fenomeno. Tamen, mi sukcesis prezenti pere de la sistemo de Esperanto almenaŭ la ideon de la antropologo Franz Boas, ke gramatiko devigas parolantojn aldoni logike ne bezonatajn informojn. Ekzemple, dum la gramatika nombro mankas al multaj lingvoj, Esperanto gramatike postulas distingi inter singularo kaj pluralo. Mi volis instrui al la studentoj la paradokson, ke ĉi tiu gramatiko agas kvazaŭ „kateno" por komencantoj, sed poste donas liberecon kiam oni finfine ekposedas la lingvon. Tamen, ĉi tiu nure teoria kaj gramatika aliro, kombinita kun la troa dependeco de la scio pri la angla lingvo de studentoj aldone al la manko de provizita socia kunteksto, igis la unuan kurson de Esperanto tute malsukcesa. Tial, mi mem nomis ĉi tiun unuan sperton pri instruado de Esperanto en Kumamoto klara „fiasko".

2. Kiota Universitato de Sangyo (Ekde 2019): Defioj pri studenta intereso kaj reformo de instrumaterialoj

Post la amara sperto en la Universitato de Kumamoto, pasis longa tempo dum kiu mi ne sentis bezonon instrui lingvistikon per Esperanto. Tamen, la sekva ŝanco instrui la lingvon venis al mi de la Kiota Universitato de Sangyo (aŭ Industrio). La universitato mem havas grandan skalon, kun pli ol 13 000 studentoj en la bakalaŭra programo kaj ĉirkaŭ 1 700 studentoj en la fakultato pri fremdaj studoj. Kvankam la preciza kialo de la kreado de la nova kurso restis iom neklara, la propono venis al mi simple pro la manko de esperantistaj profesoroj en kaj ĉirkaŭ Kioto.

La universitato mem postulis, ke la nova kurso ne estu en la kategorio de ordinara „lingvokurso", sed prefere „unu-semestra prelego" por unuajaraj studentoj de la Fakultato pri Fremdaj Lingvoj. Tamen, ili ankaŭ aldonis iom kontraŭdiran postulon: instrui tiel, ke la studentoj akiru almenaŭ iom da praktika lingva kapablo. Kvankam estas evidente neeble ellerni ĉiujn aspektojn de Esperanto dum nur unu semestro, mi kuraĝe akceptis la defion kaj komencis instrui en la jaro 2019.

Dum la unuaj jaroj (2019–2022), mia instrumaterialo baziĝis sur la klasika „Dekses-artikola gramatiko" de Hasegawa Futabatei, kaj mi uzis lecionojn konsistantajn el po du paĝoj. Mi klarigis la historion, kulturon kaj

socion de Esperanto per jutubaj filmetoj en la komenco de ĉiu klaso, kaj donis al la studentoj ekzercojn por legi mallongajn frazojn kaj tekstojn ekzemple el „Proverbaro Esperanta”.

Tamen, mi baldaŭ renkontis grandan problemon: la studentoj tre rapide perdis intereson. En japanaj universitatoj, la unuaj du lecionoj ofte funkcias kiel „provperiodo” dum kiu studentoj observas la kurson antaŭ ol vere registriĝi. Ĉar multaj studentoj serĉis malseverajn kursojn por facile gajni studpoentojn, ili seniluziiĝis kiam mi anoncis en la unua leciono, ke la kurso postulos tri etajn ekzamenojn kaj unu finan ekzamenon. Sekve, dum la unua leciono allogis ĉirkaŭ 30 studentojn, al la dua venis malpli ol 20. Kvankam ekzistis diligentaj studentoj, fine malpli ol 15 studentoj sukcesis gajni la du studpoentojn de la kurso.

Meze de tiuj defioj venis la kronvirusa pandemio, kiu malebligis miajn esplorvojaĝojn al Papuo-Novgvineo. Feliĉe, ĉi tio donis al mi valoran tempon por profundigi mian studadon pri Esperanto kaj krei pli bonajn instrumaterialojn. Pripensante miajn instruajn spertojn, mi konsciis pri grava principo pri lingvoinstruado: por ellerni lingvon, „praktiko” estas pli grava ol gramatika klarigo, kaj „instigado” (motivado) estas eĉ pli grava ol praktiko mem. Se studentoj ne amuziĝas kaj ne havas motivadon, ili neniam sukcesos memvole praktiki la lingvon.

Tial, en la jaro 2023, mi draste reformis mian lernolibron, kreante novan version titolitan „Paŝon Antaŭen: Enkonduko al Esperanto”. Por fari la lecionojn pli allogaj, mi rekte rilatigis ĉiun lecionon al iu mallonga, amuza jutuba filmeto, kiel „Mazi en Gondolando”, diversaj kantoj, aŭ videoj de usona esperantisto Alekso Miller. Tio ankaŭ ebligis al la studentoj efike studi hejme kun voĉoj kaj bildoj. Plie, mi decidis toleri filmetojn, kiuj enhavas malgrandajn gramatikajn erarojn aŭ malbonan prononcon, opiniante ke toleremo al ies eraroj mem estas fundamenta parto de la esperanta spirito.

Ĉi tiu reformo montriĝis tre sukcesa. Danke al la filmetoj, la instruado fariĝis multe pli amuza ol antaŭe, kaj mi sukcesis krei bonegan kaj vivecan etoson en la klasĉambro. Kvankam la kurso aperas ĉiujare, en la jaro 2025 mi persone ne gvidas ĝin; la nuna instruisto estas s-ro Kadoja (Hidenori). Tamen, mi planas reveni por denove gvidi ĉi tiun allogan kurson en la venonta jaro.

3. Universitato de Kioto (Ekde 2021): Lingvistikaj esploroj, defioj dum la pandemio, kaj la apero de novaj talentoj

En la jaro 2021, mi komencis instrui Esperanton en la Universitato de Kioto, al kiu mi nuntempe apartenas. Post la komenca sperto en Kumamoto kaj dum mi ankoraŭ instruis en la Kiota Universitato de Sangyo, mi serioze ekpensis fariĝi fakulo pri Esperanto, parte pro la influo de la kronvirusa pandemio.

La akademia medio kaj la strukturo de la kursoj

La situacio en la Universitato de Kioto estis tre malsama kompare kun miaj antaŭaj laborlokoj. Ĝi estas tre granda institucio kun pli ol 12 000 studentoj en la bakalaŭra programo kaj pli ol 9 500 en la postdiplomaj programoj, havante sume ĉirkaŭ 22 000 studentojn kaj pli ol 6 000 instruistojn en 10 fakultatoj. En la fakultato pri homaj studoj, ĉirkaŭ 60 studentoj (30 bakalaŭraj kaj 30 postdiplomaj) fake studas pri lingvistiko. Ĉar la fakultato jam regule instruas multajn „ekzotajn lingvojn", kiel la tibetan, la tajan, la mjanmaran (birman), la vjetnaman, la manĉuran kaj eĉ la sumeran, mi ne bezonis oferti mian lingvokurson kadre de lingvistika fako.

Sed, tamen, mi denove utiligis la kadron de ***„faka prelego pri lingvistiko"*** por prezenti gramatikajn strukturojn de Esperanto. La kurso estis malferma al kaj bakalaŭraj kaj postdiplomaj studentoj, donante po du studpoentojn por ĉiu semestro. En la unua semestro, mi uzis la saman lernolibron, kiun mi kreis por la Universitato de Sangyo, sed ĉi-foje mi tute forigis la ekzamenojn kaj multe pli profunde aldonis lingvistikajn konsiderojn. En la dua semestro, la fokuso de la kurso ŝanĝiĝis al specifaj lingvistikaj problemoj en Esperanto: ĝiaj fonologio, morfologio kaj sintakso, kune kun prelegoj pri semantiko kaj la sociaj aspektoj de la lingvo.

Studenta partopreno kaj unikaj rezultoj

La intereso pri la kurso estis tre granda; entute 32 studentoj registriĝis, kaj 24 sukcese finis la tutan kurson. Inter tiuj, kiuj formale „malsukcesis" aŭ ne ricevis poentojn, estis fakte kvin doktoraj studentoj, kiuj tute ne bezonis studpoentojn. Ili registriĝis nur por rajti partopreni en la klaso, ĉar la universitato severe limigis la nombron de ĉeestantoj en ĉiu klasĉambro dum la pandemio. Mi plene konsciis, ke el la vidpunkto de la tradicia Esperanto-movado, oni eble kritikos min pro la ebla kreado de simple „eternaj komencantoj", kiuj baldaŭ forgesos la lingvon. Tamen, ***mia vera celo tute ne***

estis amase krei esperantistojn, sed prefere „aperigi bonajn lingvistojn kaj interesajn homojn”. Kaj tiun celon mi ja sukcese atingis.

Elstara ekzemplo de ĉi tiu sukceso estis la apero de unu profesia lingvokreanto inter la studentoj. S-ro Nakano (Tomohiro), fakulo pri keltaj lingvoj kaj studento de la Universitato de Tokio, utiligis interuniversitatan interŝanĝan sistemon por sekvi la kurson per *Zoom* kaj sukcese akiris studpoentojn. S-ro Nakano estas „artisto pri lingvoj”, kiu eĉ kreis plan-lingvon por televida dramo. Krome, pluraj aliaj studentoj, kiuj partoprenis en mia kurso, jam fariĝis bonegaj lingvistoj.

Ĝeneralaj kursoj kaj pedagogiaj pensoj

Por mi persone, ĉi tiu faka kurso en Kioto estis tre signifa, ĉar ĝi ankaŭ ebligis al mi mem publikigi plurajn sciencajn artikolojn pri Esperanto en Japanio, en Sud-Koreio kaj en „Esperantujo”. Krom la faka prelego por lingvistikaj studentoj, mi foje instruis Esperanton al la unuajaraj studentoj, kiuj ne fake studas lingvistikon. Mi ekzemple gvidis ĝeneralajn kursojn sub la kadro ***„ILAS seminario: Esperanto-enkonduko”*** dum la akademiaj jaroj 2022 kaj 2024. Por ĉi tiuj nefakaj studentoj, la enhavo de la kurso estis la sama kiel tiu uzita en la Kiota Universitato de Sangyo.

Pripensante miajn instrumetodojn inter la jaroj 2022 kaj 2023, mi konsciis pri danĝera „kaptilo de Esperanto”: pro ĝia ŝajna simpleco kaj eŭropa logiko, studentoj foje havas la iluzion, ke ili jam komprenis la tutan lingvan strukturon nur per sia kapo. Mi rimarkis, ke troa emfazo pri reguleco kaj simpleco povas esti malhelpa, ĉar eĉ Esperanto postulas striktajn gramatikajn formojn (kiel la devigan distingon inter la tempoj „estis, estas, kaj estos”), kiujn oni devas uzi eĉ kiam ili ne estas logike necesaj por la kunteksto. Tial mi komprenis, ke „instigado” aŭ motivado de la studentoj estas multe pli grava elemento en la klasĉambro ol nura teoria instruado.

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Nvard Manveljan.
Lerneja: Julián Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Oberrauch, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

Regulara: Marija Belošević, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Gong Xiaofeng (Arko), Kimura Goro, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: Katalin Kováts, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontakt-persono: Zsófia Kóródy, *zsofia.korody@esperanto.de.*

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: Aimé-Patrick Manirakiza. Observanto de TEJO ĉe ILEI: Espoir Kasati.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: Ahmad Reza Mamduhi. Observanto de UEA ĉe ILEI: Gong Xiaofeng (Arko).

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. Nedeljka Ložajić, *nedeljkalozajic@gmail.com*.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: Zsófia Kóródy.

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: Ron Glossop, Leysester Miro.

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: Alessandra Madella, *a.madella@tiscali.it*, Didier Janot, *didier.janot@gmail.com*, Emmanuel Desbrières kaj Maximiliano Garcia.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj

Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatuo en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.
Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.
La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:
a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.
b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ-aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto: dr. MURÁNYI Péter, *HU-9730 Kőszeg, Rákóczi u. 111.*
Teknika helpo: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio.
Redaktoro: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario,*
jozefo.nemeth@gmail.com, tel*: (+36-70) 931-0530.*
Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena POSHIVANA, *olenaposivana@gmail.com*.
La adreso de nia arkivo: *https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php*.
Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aprilo 2026,
redaktofino por la sekva numero la 15-an de aŭgusto 2026.


ESPERANTO POR LA JUSTA KOMUNIKADO.
ESPERANTO OIKEUDENMUKAISEEN YHTEYDENPITOON.
정의로운 소통을 위한 에스페란토어
ESPERANTO POUR UNE JUSTE COMMUNICATION
Esperanto for just communication.
! ESPERANTO ist die Sprache des Friedens !
ESPERANTO JE JEZIK MIRA!
ESPERANTO
ESPERANTO: para uma justa
toki EPELANTO
tawa toki pona

